



# la informilo

ISSN: 0291-6037

\*\*\*

## informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

### ESPERANTO - FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto  
Maison des Jeunes et de la Culture

27, rue de la République, 54000 NANCY F

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY



nouvelle série  
trimestriel  
4<sup>e</sup> trimestre 1983  
n° 44

abonnement  
un an: 22F  
eksterlando  
30FF au 12 R.K<sub>oj</sub>

## ANTO - FLASH... ESPERANTO - FLASH... ESPERANTO




### ESPERANTO

\*\*\*\*\*

Rompant délibérément avec l'attitude superbement ignorante des "grandes stations", les Radios Libres apportent de plus en plus un soutien efficace et

désintéressé aux militants espérantophones. C'est ainsi que pour la région Est de la France, après "Radio-Graouilly" (METZ 57) qui assure une émission hebdomadaire sur l'espéranto, "Radio-Amitié" (Mulhouse 68), après une interview de l'équipe espérantiste locale, a inséré 4 séquences mensuelles sur l'Espéranto (2 lundis répétés sur 2 jeudis), "Radio-Bergamote" (Nancy 54) a diffusé un reportage complet sur le 18ème stage d'Espéranto Parlé qui s'est déroulé les 26 et 27 novembre à VILLERS-lès-NANCY. De son côté, "Radio-Bulle" (Bar-le-Duc 55) a permis au club local de présenter durant une heure le panorama complet des activités liées à la pratique de la Langue Internationale dans le cadre de la série du samedi intitulée "Quoi de neuf dans votre Association?" Nous publierons prochainement une liste des émetteurs ainsi que leurs coordonnées d'écoute.

Un congrès culturel et touristique dans notre belle Alsace...  
Inscrivez-vous vite!...



---

★

## LORSQU'UN DIPLOMATE VEUT PERSUADER...

Il est d'usage, pour un grand nombre de représentants d'Etats, de saluer les participants de chaque Congrès Universel d'Espéranto, au cours de la cérémonie officielle d'ouverture. Traditionnellement chacun d'eux s'exprime bien sûr dans sa langue maternelle. Quelques-uns, sans doute tourmentés par un problème de conscience ou d'amour propre personnel, apprennent par coeur, en espéranto, les quelques phrases du message.

M. Fattah Ezzel Din, Premier Secrétaire de l'Ambassade d'Egypte à Budapest, a tenu à aller au-delà du simple témoignage d'amabilité: c'est en effet en espérantophone véritable qu'il s'est adressé au Congrès après un apprentissage intégral de la Langue Internationale.

Puisse son exemple constituer un stimulant dynamique pour 1984 à VANCOUVER!

---

★

## VANCOUVER PREPARE LE 59ÈME CONGRES UNIVERSEL D'ESPERANTO

*Après l'Amérique du Sud en 1981 (BRASILIA), c'est l'Amérique du Nord qui accueillera les assises Internationales Espérantistes de 1984. L'Université de "British Columbia" offrira toutes ses installations pour assurer le déroulement confortable de ce grand rassemblement.*

*L'avant-congrès aura lieu à MONTREAL du 14 au 20 juillet. Pour permettre aux participants venus de tous les pays du monde de profiter au maximum de leur séjour au Canada, la section spécialisée de l'entreprise de voyages ELNA -en collaboration avec U.E.A.- a déjà élaboré un programme d'excursions originales durant les périodes du 7 au 21 juillet et du 29 au 12 août. Toutes informations peuvent être fournies au siège de HOWARD TRAVEL SERVICE, 578 Grand Ave., OAKLAND CA 94610. Par ailleurs des caravanes spécifiques seront organisées à partir de plusieurs pays d'Europe.*

---

★

## UNIVERSITAIRES EMINENTS... ET ESPERANTOPHONES CONVAINCUS.

Huit conférences, suivies chacune par un public de cent personnes, ont été données dans le cadre du programme culturel du Congrès Universel de Budapest.. Des débats fructueux -en espéranto bien sûr!- ont permis aux auditeurs d'approfondir les thèmes traités parmi lesquels nous citerons: "Est-ce que l'intelligence est mesurable? Est-elle héréditaire?" (Dr FRANK - R.F.A.); "Confucius et ses regards sur l'Economie" Dr SO GILSU - COREE DU SUD); "Futurologie Ecologique" (Dr MARINOV - BULGARIE); "Médecine et (ou) psycho-thérapie" (Dr EICH-HORN - R.D.A.); "L'asymétrie fonctionnelle du cerveau et ses répercussions dans le domaine de l'éducation" (Dr BELA MESZAROS - HONGRIE).

---

★

## MINI-CONGRES POUR 42 ENFANTS DE 12 PAYS

*C'est toujours avec étonnement mêlé d'admiration que les journalistes et reporters assurent les interviewes de ces jeunes garçons et filles qui jouent, discutent, montent un petit spectacle -le tout en espéranto- le temps d'un Congrès Universel. Venus cette année d'Islande, de Finlande, d'Italie, de Hongrie, de Bulgarie, de Yougoslavie, de Belgique, des Pays-Bas, d'Allemagne (RFA et RDA!), de Pologne et de France, ce groupe de congressistes en herbe a témoigné, par ses activités, combien la pratique de la langue espéranto était génératrice d'une amitié spontanée et durable. Organisé pour la vingtième fois, ce rassemblement de jeunes enfants d'horizons et de tempéraments divers, a parfaitement justifié de la nécessité de l'enseignement de la langue internationale dans toutes les écoles du monde.*

---

★

## RADIO-POLONIA EN TETE DES STATIONS EMETTRICES EN ESPERANTO

En ajoutant une sixième émission à son programme quotidien la station polonaise permet pratiquement à tous les espérantophones du monde entier de capter un programme diffusé entièrement en espéranto. Ces six émissions s'échelonnent en effet de 7h30 à 23h30 (GMT) et présentent une série de séquences variées où

se mêlent information, culture, sciences, reportages, spectacles, musique... Le courrier des auditeurs étrangers est, de plus, très abondant et leurs interventions n'exclut nullement la polémique. Le programme détaillé de ces émissions en espéranto est fourni sur simple demande à RADIO-POLONIA, E°-RE-DAKTORO, VARSOVIO, Pollando.



## 80 JEUNES SOVIETIQUES AU CONGRES DE DEBREÇEN (23/30 JUILLET)

*C'est en effet la plus forte participation jusqu'à ce jour de jeunes gens et de jeunes filles venus d'URSS pour assister au Congrès Mondial de la Jeunesse Espérantophone, le 39ème du nom. Cette confrontation Est-Ouest est un événement qui mérite réflexion si l'on ajoute que les 672 participants représentaient quarante nationalités... et que le thème du Congrès s'intitulait "L'information dans le monde d'aujourd'hui". Les séquences de travail ont alterné avec des formes de détente très diverses; mentionnons "l'exploit" de la nouvelle section de TEJO: vingt cyclo-touristes ont rallié DEBRECEN après un premier rendez-vous à PASSAU. Ils ont certainement motivé tous les fervents de la bicyclette, futurs participants du 40ème CONGRES (SWANWICK - G.B., du 13 au 20 juillet 1984).*



## LA REPUBLIQUE DE SAN MARIN INNOVE!

La plus ancienne -et la plus petite!- République d'Europe, sera sans doute le premier Etat au monde à officialiser la Langue Internationale comme instrument de travail de l'une de ses institutions. La nouvelle Académie des Sciences, créée en mai 1983, vient en effet d'insérer l'espéranto dans l'éventail des langues utilisées... "pour ses qualités reconnues: concision, précision, adéquation à l'ordinateur, facilité d'étude et neutralité". L'espéranto deviendra la langue privilégiée des futures publications de la nouvelle Académie.



## 1ER SYMPOSIUM D'INTERLINGUISTIQUE ET D'ESPERANTOLOGIE

*Il s'est tenu en mai à MARINA DI MASSA (Italie) avec la participation d'universitaires de nombreux pays. Les élèves d'une école élémentaire de CAGLIARI (Sardaigne) ont fait une excellente impression en présentant des chants et un récital poétique en espéranto.*



## DES JALONS POUR L'ANNEE INTERNATIONALE DE LA PAIX (1986)

Dans le cadre du Congrès Universel (Budapest), des représentants de l'Association Universelle d'Espéranto ont été invités par M. ROMESH CHANDRA, actuel Président du Conseil Mondial de la Paix, en vue d'étudier les possibilités d'une collaboration éventuelle des deux organisations, dans la perspective de 1986, déclarée par l'ONU "ANNEE INTERNATIONALE DE LA PAIX". R. Chandra, conscient de l'apport exceptionnel de la Langue universelle pour l'amélioration de la compréhension mutuelle des peuples, a déclaré entre autre: "Il s'avère bien plus nécessaire d'instaurer un dialogue permanent pour résoudre les problèmes mondiaux que de recourir à la guerre!".



## UNE "PREMIERE" MONDIALE DANS LES TECHNIQUES INFORMATIVES SUR L'E°

*A l'instigation de l'Union Française pour l'Espéranto, la troupe théâtrale "CHRY-SALIDE" vient en effet de mettre au point une véritable pièce destinée à sensibiliser tous les publics sur les difficultés de la compréhension entre groupes linguistiques différents et la solution irremplaçable de l'espéranto pour les résoudre.*

*Intitulé "L'ESPERANTO... CA M'INTERESSE!" ce spectacle écrit, mis en scène et*

.../...

4 joué -avec quelle verve!- par "KRIZALIDO", une équipe d'acteurs déjà bien connue des milieux espérantophones mondiaux, a été "audio-visionné" tout récemment à PARIS. Il est d'ores et déjà à la disposition de toutes les Associations Culturelles et organisateurs de spectacles ou autres qui pourront exploiter par ce biais un moyen original, moderne -et persuasif!- de documenter en le distrayant, un public souvent mal informé sur la Langue Internationale. Tous renseignements sur les tournées de "CHRYSALIDE" auprès du siège social: LA CHRYSALIDE (ou KRIZALIDO), 15, Rue Clermont, F-46100 FIGEAC.

---

## ★ NOUVEAU SUCCES POUR LE 18ÈME STAGE D'ESPERANTO PARLE DE NANCY

Invités pour une fin de semaine studieuse (26/27 novembre) à la MAISON DE L'ASNEE à Villers-lès-nancy, près de 70 stagiaires -dont plusieurs venus d'Allemagne... et même d'Angleterre- ont pu pratiquer la Langue Internationale à l'occasion de cours à 4 niveaux. Le cours d'initiation avec comme support la nouvelle méthode synthétique mise au point par une équipe pédagogique de l'U.F.E. a fortement sensibilisé les participants, bien décidés à poursuivre leur étude grâce au cours par correspondance. Les "forts en langue" du 4ème degré ont débattu, parfois avec passion, de problèmes d'éthique et de sociologie autour d'un ouvrage de science-fiction écrit directement en espéranto. Les stagiaires ont également pu découvrir le nouveau matériel d'exposition itinérante de la Fédération, entièrement réactualisé et mis à la disposition de tous les groupes intéressés. Le service de librairie a fonctionné à plein... puisque plus de 6000 F d'ouvrages, de disques et de cassettes ont été vendus pendant le week-end!

La "RONDA TIPICA", groupe folklorique portugais, a animé la soirée de manière endiablée... révélant en particulier une équipe de très jeunes danseurs. Le prochain stage est d'ores et déjà programmé pour les 23 et 24 juin 1984 à METZ.

---

## ★ DES COURS PREUNIVERSITAIRES EN ESPERANTO

*L'Institut pour les Sciences de l'Education (Université de Santiago de Compostelle, Espagne) a répondu positivement à une proposition qui vise à organiser des cours préuniversitaires de mathématique, physique et chimie en espéranto. Le problème de leur financement est actuellement à l'étude. Le matériel pédagogique utilisé sera élaboré par une équipe internationale de Professeurs d'Université pratiquant l'espéranto. Le projet prévoit un fonctionnement optimum de cette université originale en 1986 ou 1987.*

---

## ★ 4ÈME MEETING INTERNATIONAL DE "L'AMITIE ENTRE LES PEUPLES"

Celui-ci s'est tenu à Rimini (Italie) du 21 au 28 août 1983 avec le thème suivant: "Homme, singe... et robot". Ce séminaire a réuni des spécialistes éminents de paléontologie, théologie, histoire, futurologie... et de nombreux artistes et poètes. Un stand attractif a été mis en place par les membres de l'Association Catholique Mondiale Espérantiste: défense des droits de l'homme, aide aux lépreux et aux non-voyants du Ghana, bourses pour les étudiants du tiers-monde... Des milliers de jeunes gens se sont vivement intéressés à cette exposition et le vice-président du Conseil des Ministres, Am Amaldo Forlani a déclaré lors de sa visite: "nous avons besoin de l'espéranto".

---

## ★ RADIO-FRANCE INTERNATIONALE...

*Le 1er novembre 1983, Radio-France Internationale a consacré une émission de six minutes environ sur la Langue Internationale Esperanto... en anglais!!!*

---

## ★ EST-CE UN RECORD ABSOLU?

Le 10 juillet 1983, la station de radio locale de Chongqing, l'une des plus grandes cités chinoises, inaugurait un cours d'espéranto étalé sur 4 mois, à raison de 3 émissions quotidiennes et répétition d'une heure le dimanche. L'engouement a été tel que 10 jours après la diffusion de la première émission, plus de 5000 auditeurs ont demandé à se procurer le livre d'étude couplé aux séquences parlées!



## UN GRAND DICTIONNAIRE ALLEMAND-ESPERANTO

*Il s'agit là d'une édition toute nouvelle qui vient de voir le jour à Leipzig. Les 591 pages de l'ouvrage élaboré sous la direction de E.D. Krause, font en plus une large part à toutes les tournures de la langue d'aujourd'hui. L'utilisateur appréciera de surcroît un recueil de nombreux proverbes bilingues. De bonne présentation, d'un format commode, d'un prix très abordable, ce manuel, sans doute édité en nombre trop restreint, est appelé à rendre d'éminents services aux espérantophones allemands.*



## L'ESPERANTO AU SERVICE DU TOURISME

La liste des documents touristiques édités en espéranto et destinée à promouvoir les qualités d'accueil et de séjour de villes ou de sites touristiques, s'enrichit ne permanence. Parmi les récentes initiatives en ce domaine, citons une belle brochure sur SARAGOSSE, lancée à l'occasion du 43ème Congrès Espagnol d'Espéranto = *Excmo Ayuntamiento, Delegación del Patrimonio, Historico-Artístico, ZARAGOZA, Hispanio.*

Un prospectus en couleurs invite le voyageur à s'attarder à LEUTKIRCH, dans le sud de l'Allemagne Fédérale où a eu lieu le 13ème "Congrès de l'Amitié".

= *Verkehrsverein Leutkirch, D-7970  
LEUTKIRCH 1, F.R. Germanio.*

Le document le plus original nous vient sans doute de Norvège. Le Ministère des Affaires Extérieures vient en effet de parrainer sa parution: il s'agit d'une présentation en 8 pages de grand format des premières églises construites sur pilotis et qui datent pour la plupart du Moyen-Âge. = *Norvega  
Esperantista Ligo, Olaf Schousv. 18, OSLO 5, Norvegio.*

Vous pouvez vous procurer ces brochures en écrivant en espéranto aux adresses indiquées.



## LE SCOUTISME ET L'ESPERANTO

*Pour qui a déjà vécu un Jamboree Mondial, le problème de la communication intégrale entre participants est toujours apparu comme générateur de difficultés de tous ordres. Une "Ligue Scoute Internationale Espérantiste" existe certes depuis des décennies mais le traditionalisme rigoureux des grandes associations nationales scouts concernant les langues (en France les SDF et les EDF) n'a jamais permis de contacts fructueux avec la S.E.L°. Aussi convient-il d'apprécier la nouvelle tentative de cette dernière, laquelle a fait fonctionner du 4 au 14 juillet 1983, lors du Jamboree de Calgary au Canada, une exposition sur l'espéranto avec distribution de tracts, et de brochures en 9 langues. L'intérêt évident manifesté par les scouts de toutes nationalités à l'égard de cette initiative ne devrait pas rester sans lendemain.*



## ASSEMBLEE GENERALE DES JEUNES ESPERANTOPHONES FRANCAIS

Elle s'est tenue à PARIS le 2 octobre. Rapport moral et financier, élections au nouveau au nouveau Bureau n'ont pas suscité de graves débats. Signalons que 3 jeunes espérantistes de notre Fédération se sont vu confier des tâches de direction: Bernard VIVIER, membre, Philippe DAUTREVILLE, secrétaire et Anne AMBLES qui a été élue Présidente. Un programme de rencontres futures a été proposé. Mentionnons le Carnaval International de BAR-le-DUC -55 (du 16 au 18 mars 1984), une rencontre franco-allemande en Normandie à la mi-août et une rencontre co-organisée avec les Jeunes de SAT6Amikaro.

## angulo de la prezidanto

Karaj gesamideanoj,

Aliloke mi havas la plezuron vin inviti al nia venonta federacia kongreso en Munster. Unu el ties temoj estos: kiel reklami por nia federacia perkoresponda kurso? pro tio, jam nun, kaj ree, mi deziras insisti, por ke vi klopodu trovi lernantojn por ĝi. Vi ja mem konstatas, ke malfacilas, regule kunveniigi multflanke okupatajn homojn je difinita momento. Sed hejma studado laŭ la disponebla tempo pli taŭgas. Tian studadon ja nun sufiĉe regule kompletigas niaj staĝoj, kie eblas ekkoni esperantistan etoson. Memoru do nian devizon: ĉiu malkovru almenaŭ unu lernanton!

Ĉar jam alproksimiĝas la jarfinaj festoj, mi tuj deziras al vi agrablan festadon kaj feliĉan novan jaron. Ne nur al vi mi deziras tion, ankaŭ al via paren caro kaj al ĉiuj viaj multegaj amikoj, kiuj ... certe ĝojus, se vi donacus al ili diskon aŭ kasedon kun esperantlingvaj kanzonoj. Ĝojus ili, samkiel niaj artistoj, kiuj povus baldaŭ investi por novaj produktaĵoj, kio plej efike helpas al rapida disvastigo de nia lingvo.

Dankon por via subteno,

\*\*\*\*\*

Edmond LUDWIG

★  
ENCORE UNE INITIATIVE DE L'UNION FRANCAISE  
POUR L'ESPERANTO !!!

"METODO 3"... ou "Mes 3 rendez-vous avec la  
Langue Internationale"

Bonan tagon!



saluton!

**ESPERANTO - JUNIOR** ★  
\*\*\*\*\*  
mon premier rendez-vous  
avec la langue internationale

**JEUX DE MOTS** =====

(1)

Créé en 1887 par le médecin polonais ZAMENHOF, l'espéranto est la plus facile des langues vivantes.

\* **L'ORTHOGRAPHE:** une lettre  un son... un son  une lettre et toujours de problèmes d'orthographe!

\* **PRONONCIATION:** chaque lettre se prononce... une liasse de 3 documents utilisables dans tous les Cours Moyens 2ème année de toutes les Ecoles Elémentaires de FRANCE... pour sensibiliser les élèves à l'existence de l'ESPERANTO...

= ...simple d'utilisation

= ...efficace dans sa conclusion... Peu onéreuse de surcroît.

Utilisez dès à présent ce support concret lors de votre prochaine visite à l'Ecole la plus proche de votre domicile (ou à celle de votre choix!).

(Une notice explicative détaillée -en espéranto- sera jointe à toute commande)

Sur mapo de *Alzaco*, inter *STRASBOURG* kaj *MULHOUSE*, vi rimarkas valon boriĝantan en la *Vogezojn*. Pli ĝuste estus diri valojn!... Efektive, de la kresto -1361m ĉe la plej alta pinto-fluas nombraj rojoj kaj formas la grandan kaj la malgrandan *Fecht*, t.e. du montriveretoj, kiuj fosis la grandan kaj la malgrandan valojn de *MUNSTER*. La pejzaĝo estis kreita de la glaĉeroj en la kvaternara erao kaj vidigas alpajn krestojn, trogformajn valojn kaj glaĉerajn lagojn.

**K**io allogis homojn en tiun malmildan regionon, kies vintroj longe daŭras, kie neĝo ne fandiĝas sur la pintoj antaŭ majo? Skotaj benediktanaj monaĥoj instalas sin tie - dum la sepa jarcento kaj apud la abatejo formiĝis *Munster* ĉe la konfluo de la du *Fecht* kaj iom post iom aliaj vilaĝoj sur la bordoj de la du riveretoj.

En la jaro 1235-a *Frederiko 2a* rilatigis la abatejon al la germana imperio, al kiu, *Alzaco* apartenis. Baldaŭ, forĵetanta la submetiĝon de la monaĥejo, *Munster* iĝis imperia urbo. Kun la aliaj domaroj de la valoj ĝi konsistigis komunumon, kiu mastrumis siajn havaĵojn, precipe la ĝis 1846 nedividitan arbaron. La 16an jarcenton, *Reformatio* aperigis kromajn problemojn inter la urbo kaj la abatejo. finfine la pastro kaj la loĝantaro elektis protestantismen kaj post batalado proprigis al si la preĝejon. Videbla sur la merkato-placo kiel simbolo de la burĝa sendependeco, fonto kun leono memorigas tiun eventon. Cetere tiu leono spite turnis sian postaĵon al la abatejo. Nuntempe, post fino de la kverelo, ĝi afable rigardas orienten...

**L**a sekvantan jarcenton, la tridekjara milito tre grave elprovis la valon: epidemioj, malsatego kaj bataloj pereigis la plej multon de la loĝantaro. Oni apelaĉis al la svislandanoj kaj tirolanoj por reloĝatigi la landon. De tiu tempo restas spuroj en la popolokantoj kaj la muziko kaj precipe ĉe la muzikinstrumentoj: ankoraŭ hodiaŭ, grimpane sur la kreston, oni kelkfoje aŭdas la sonon de la *alphorn*, tiu longega korno, per kiu la montkmparanoj vokis sin reciproke de unu farmdomo al la alia.

En 1673 francaj trupoj okupis *Munster*, kiu iĝis franca. Post vana luktado la *Munster-a* burĝaro tiam perdis siajn lastajn rajtojn kaj kontraŭvole akceptis la reĝan ordo-povon. kiel la kroma *Alzaco* ĝi konservis germanajn loknomojn kaj familiajn nomojn kaj ĝis hodiaŭ sian germanan dialekton, kvankam la oficiala lingvolimo malsupreniris de la *Vogezokresto* al la *Rejno*.

**D**um la deknaŭa jarcento la ekonomio de la valo, ĝis nun precipe agrikultura kaj arbara, disvastiĝis dank' al la teksindustrio. La familio *Hartmann* donis al la urbo ne nur dinamikajn kaj sociemajn fabrikestrojn sed ankaŭ urbestrojn, kiuj pligrandigis *Munster*. Ili konstruis lernejojn, novan romanikan protestantan preĝejon, malfermis la urbon orienten per la fervojo ĝis *Colmar* kaj okcidenten per la strato kaj elektra tramo ĝis la montpasejo *Schlucht*. De la tiama germana registaro ili havigis al si la rimedojn por transformi la *vogezajn* lagojn en akvo-rezervojn. Do ne miru, se parko, stratoj kaj mezlernejo nomiĝas laŭ la *Hartmann-aj* familianoj. Nuntempe proksimume la duono de la loĝantaro de *Munster* estas laboristoj, el kiuj la plej multo kaj ankaŭ nombraj valanoj laboras "*ĉe Hartmann*".

La unua mondmilito kaŭzis grandajn damaĝojn: la francaj kaj germanaj militistaj tombejoj ĉe la montpasejo *Linge* pruvas tion. Krome pro la detruo oni vidas malmultajn, antikvajn konstruaĵojn, tamen la urbdomo (1550) estis rekonstruita post la milito. De la abatejo nur kelkaj muraj ruinoj estas videblaj.

**N**e pro tio alvenas ĉiujare multaj turistoj sed prefere pro la ĝuinda pejzaĝo. Ĉar la valo de *Munster* proponas variegeajn plezurojn: oni ĉi-tie agrable ferias la tutan jaron! tiuj, kiuj ŝatas skiadon, profitas de la neĝo dank' al nombraj ski-liftoj aŭ per belaj loipoj. Somere pli-malpli kuraĝaj marŝantoj malkovras krutajn aŭ facilajn vojetojn tra la arbaro kaj sur la kresto. Ili ĝojas pri la interesa flaŭro kaj gvatas silente timeman ĉamon. Kamparana manĝaĵo estas surtabligita de la melkistoj, kiuj bredas brutojn sur la montaj paŝtejoj. Oni regalas sin per rostitaj terpomoj laŭ la maniero de la valo kaj per la bongusta, famkonata sed fi-odora fromaĝo. Se vi venos dum la ĝusta sezono - julio/aŭgusto - vi certe gustumos nian mirtelo-kukon!

.../...

Multaj turistoj haltas jam je 2 km antaŭ *Munster* ĉe la vilaĝo *Gunsbach* por viziti la domon de la fama Doktoro *Albert SCHWEITZER*, konata pro sia kuracista helpo en Afriko. Oni kelkfoje forgesas, ke tiu Nobel-premiulo (1952) pri la paco estis ankaŭ fama muzikisto, teologo kaj filozofo, kiu ne nur predikis la respekton de la vivo sed efektive vivis laŭ tiu principo.

Ĉiam kaj de ĉiu la valo de *Munster* estas ja vizitenda sed speciale por vi ĝi estas vizitenda, kiam, okaze de la kongreso, la verda flago tie flirtos!



Christiane BUSSER

### COURS PAR CORRESPONDANCE

Depuis les vacances nous avons adressé à la presse régionale 22 communiqués pour annoncer à la fois le cours par correspondance et notre stage de novembre. Au moins 15 d'entre eux ont été insérés. Le beau temps -malheureusement persistant!- n'incitait pas le public à étudier, ces communiqués n'ont eu que peu de portée. Nous avons informé à ce jour une cinquantaine de personnes et recruté 6 élèves. Un 6ème élève du cours de l'année dernière vient de terminer l'étude: M. Hervé MOUGIN, 55200 ETAIN, dirigé par M. Pol DENIS.

NIA VIVO EN...

J.P. COLNOT

NANCY (M.J.C. Philippe Desforges) - Vesperaj kursoj

Du kursoj por komencantoj funkcias, lunde je la 18a30 kaj marde je la 20a30; ĉiu kurso varbis nur po 3 gelernantojn, sed tre bone funkcias. La vendreda kurso ne povis okazi. Por la progresantoj la 2a-grada kurso okazas la 2an kaj 4an mardon de ĉiu monato je la 18a30 kun 5 gelernantoj kaj la 3a-grada la 3an mardon kun 2 gelernantoj.

La 2a kunveno de la nuna sezono okazis la 18an de novembro je la 20a30. S-r<sup>o</sup> Al-AMILY, iraka samideano nun en Nancio, prezentis al ni mumbildojn pri sia lando, kies riĉan pasintecon li tre bone aprezigis al ni. Ĉeestis pli ol 20 personoj, parte esperantistoj kaj parte familianoj de Sr<sup>o</sup> Al-AMILY, kiuj promesis laŭeble partopreni nian baldaŭan staĝon.

La Junul-Domo Ph. Desforges funkcios kiel kutime ĝis la fino de decembro. Poste la "hejmo" por junaj laboristoj -kun ĉiuj dormĉambroj kaj ankaŭ niaj antaŭaj kurs-salonoj- estos fermita. La Junul-Domo perdis du trionojn de siaj nunaj kurs-salonoj. Ni riskas problemojn por okupado de la restantaj salonoj, ĉar ni ne estas sufiĉe multnombraj en ĉiu kurso

LIBERAJ RADIOJ = dum oktobro mi sendis al diversaj radioj (ŝtata kaj liberaj) dekon da komunikoj por anonci niajn kursojn kaj staĝon. Ĝenerale mi tute ne povis kontroli, ĉu io estis disaŭdigita aŭ ne kaj pluraj liberaj radioj, kiujn mi provis kontakti telefone, ne respondis. Mi do dissendis fine de oktobro leteron al 11 radio-stacioj ĉirkaŭ NANCY... kun poŝtmrako por la respondo. Tio estis la sola rimedo por ricevi reagon. Mi proponis al ili: 1/ ĉiumonatan komunikon pri nia aktiveco. 2/ ĉiumonatajn ĝeneralajn informojn pri E<sup>o</sup> 3/ E<sup>o</sup>-kurson. Ĝis la 20a de novembro, nur 2 elsendo-stacioj respondis:

\*RN 2000 konsentis diskonigi nur ĉiumonatan lokan komunikon.

\*RADIO-GRAFFITI kaj BERGAMOTE (88,2 MHz kaj 103,5 MHz) ĵus konsentis disaŭdigi E<sup>o</sup>-kurson. Ili proponas rendezuon por interkonsenti.

J.P. COLNOT

LASTA MINUTO: Radio-Bergamote ĵus elsendis la merkredon 30an de novembro intervju-serion kaptitan de Pol DENIS okaze de nia staĝo en Maison de l'Asnée. Tiu unuhora kasedo estos poste je la dispono de interese-mulo. Ni antaŭvidas eventualan multobligon.





# 43-a KONGRESO de Orientfranca Esperanto-Federacio



★★★★★ 5/6-ajn de majo 1984 \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_ en MUNSTER (Alzaco) ★★★★★

*Karaj gesamideanoj,*

*Plia agadjaro pasis, nova kongreso prepariĝas. Ĉi-jare mi havas la plezuron vin inviti al MUNSTER (Alzaco), kie vin akceptos nia loka skipo. Jam nun ni konsilas al vi aliĝi laŭ la proponitaj kondiĉoj, ĉar Munster estas turisma urbeto, kaj en majo jam multas la vizitantoj.*

*Vi certe ĉiuj konscias, ke sukcesaj esperanto-kongresoj dum la jaro de la Eŭropaj balotoj -ĉefe kiam la eŭropaj instancoj ekinteresiĝas pri Esperanto- plej gravas. Vi helpos nin per via ĉeesto! Cetere vi ĝuos prelegon de Claude NOURMONT-MOON: "Mond-vojaĝo per esperanto". Ankaŭ sin anoncis Stefan MAUL, ĉefredaktoro de "MONATO" kaj Feri FLORO, hungara kantisto.*

*Al niaj eksterlandaj geamikoj ni proponas paralelan turisman programon. Tre certe ili ĝuos la etoson, kun kiu multaj el ili jam konatiĝis dum antaŭaj aranĝoj en Colmar, Mulhouse aŭ Soultzbach-les-Bains.*

*Koran inviton al vi ĉiuj!*

*E. Ludwig*

\*\*\*\*\*

**frua aliĝo gravas!**

→  
vidu  
dorsflanke

S-r<sup>o</sup>  S-in<sup>o</sup>

— \* ALIĜILO \* —

( bonvolu laŭnecese krucumi )  
en la eta kvadrato.

NOMO:

Antaŭnomo:

ADRESO:

Nomo de la akompanantaj personoj (bonvolu precizigi "Sinjoro" aŭ Sinjorino):

1/ 3/  
2/ 4/

Ni alvenos... per trajno  per aŭtomobilo



MUNSTER estas turisma, tre vizitata urbeto. Necesas do rezervi jam en januaro por havi ĉambron en majo/junio laŭ favoraj kondiĉoj. Se vi aliĝas antaŭ la 15a de januaro 1984, ni garantias ĉambron en hotelo laŭ jenaj prezo kaj kondiĉoj:

**tranoktado + sabata vespermanĝo + dimanĉa matenmanĝo = 110 FF**

Por postaj aliĝoj ni klopodos trovi ĉambron en proksima kategorio. ATENTU: Duonpensiono (kiel ni ĝin proponas) estas preze pli avantaĝa ol nura ĉambro. KAMPADISTOJ: kampadejoj ekzistas en kaj ĉirkaŭ MUNSTER.

# KONGRESEJO AKCEPTEJO



Salle de la LAUB  
Rue Saint-Grégoire  
68140 MUNSTER

## PROGRAMO

\*\*\*\*\*

SABATON, la 5an de majo:

Akcepto ĝis la 15a horo

15a/18a30: kongresaj laboroj  
(raportoj - elektoj)

18a30: vespermanĝo

20a30: Prelego + Spektaklo

DIMANĈON, la 6an de majo:

- 9a: - "kiel varbi lernantojn  
por nia perkoresponda  
kurso".  
- nia Federacio - UFE - UEA  
la Fakaj Asocioj  
- prelego: *La alternativa  
informaticsistemo de "MONATO"*

12a: komuna tagmanĝo

14a: komitato-kunveno

(lastminutaj ŝanĝoj eblos)

## TURISMA PROGRAMO

por  
vizitantoj

Dum la SABATA POSTTAGMEZO

kaj DIMANĈE:


### VIZITADO:

- Domo de Doktoro Albert SCHWEITZER
- Muzeo de la "Schlitte"  
(forst-ekspluatado)
- La Vogeza montaro
- Lumbildoj: "ALZACO"



Sendu viajn aliĝilon  
kaj antaŭpagon al...

S-INO CHRISTIANE BUSSE  
24, GRAND-RUE  
STOSSWIHR  
68140 MUNSTER



ĉekoj je la nomo de:  
ESPERANTO - Caisse d'Epargne  
de MUNSTER



## ALIĜOJ

### kun tranoktado ...

(relegu dorsflanke!)

aliĝkotizo	30 FF x	=	FF
dimanĉa(j)	60 FF x	=	FF
tagmanĝo(j)			
tranoktado*	110 FF x	=	FF
("duon-pensio")			
(posta aliĝo) ...	FF x	=	FF
	sumo		FF

ANTAŬPAGO: Francoj antaŭpagu la tranoktadon\*  
(bank- aŭ postĉeko).

Eksterlandanoj sendu proksimuman  
sumon de la tranoktado per mon-  
biletoj.

### sen tranoktado...

aliĝkotizo	30 FF x	=	FF
dimanĉa(j)	60 FF x	=	FF
tagmanĝo(j)			
sabata vesper- manĝo: libera		sumo	FF

ANTAŬPAGO: 40 FF por persono  
(bank- aŭ postĉeko)

Eksterlandanoj pagu surloke.  
tamen gravas frua anonco por  
mendo de la tagmanĝo. Dankon!

\*\*\*\*\*

KIEL PSIKOLOGIE TESTI  
EÛROKANDIDATOJN?

--

Antaŭ ol konfidi taskon al iu, estas saĝe testi ties kapablon ĝin plenumi. Por testi la kandidatojn al la Eŭropa Parlamento, disponeblas taŭga tereno: la lingva. Kiam vi ĉeestos kunvenon, en kiu kandidato invitas vin voĉdoni por li, testu lin per demandoj tiukampaj. Ili rivelos al vi multon pri li.

Demandu ekz-e: *"Kion vi proponas fari pri la lingvoj, kiam Greklando (Portugalia, Hispanio) aliĝos al la Komunumo?"*

Se li respondos: *"Ni daŭrigos la nunan sistemon: la lingvo de ĉiu nova aliĝinto fariĝos oficiala kaj oni tradukos ĉion en ĝin"...* Tio signifas, ke li pretas uzi la monon el viaj impostoj tute neracie, elspezante multe pli ol taŭga komunikado postulas. Vi povas taksi lin nepraktika homo, finance nerespondeca.

Se li respondos: *"Tio devigos nin uzi nur la anglan"...*, tio signifas, ke li favoras negalecon en la rilatoj kaj pretas klini sin antaŭ la plej potenca. Tia homo ne komprenas la dignecon de iu malgranda kaj cedos sen defendi vin antaŭ ĉia premo de fortuloj.

Se li respondos: *"Ni uzos nur la grandajn lingvojn: anglan, francan kaj germanan"...* tio rivelos similan trajton. Tiel ja reagis homo, kiu provas trovi kompromison inter ĉiuj granduloj kaj la malfortulojn komplete neglektas. Ankaŭ ĉi-tiu ne defendos vin, kara simpla, eta, senpotenca eŭro-elektanto. Lia sinteno ne aŭguras bone pri agado sur la socia kampo, kie ĝuste negranduloj meritas protekton.

Se li respondos: *"Ĉiu lernu du lingvojn de aliaj ŝtatoj"...*, tio povas signifi du aferojn. Se li akceptas, ke Dano, ekz-e, lernu la nederlandan kaj la grekan, li estas ne realisma, ĉar kiel tiu Dano interkompreniĝos kun Anglo, kiu lernis la italan kaj la francan? Tiu homo favoras pseudo-solvon, kiu solvas nenion kaj denove devigas elspezi vian impostmonon en multflankajn tradukadon kaj interpretadon. Sed eble li fakte sugestas, ke inter tiuj du lingvoj nepre troviĝu, ni diru ekz-e, la angla. Se tiel estas, li apartenas al unu el la du ĵus cititaj kategorioj, kun kroma persona trajto, interesa por vi: li ne estas malkaŝa. Kandidaton, kiu tiel respondos, vi do povas klasi inter la homojn, kiuj, ĉu bonintence, ĉu malsincere, preferas pseudo-solvon al solvo. Li defendos vin bel-fraze, eble, sed nerealisme.

.../...

COMMENT TESTER PSYCHOLOGIQUEMENT  
UN CANDIDAT "EUROPÉEN"?

--

Avant de confier une tâche à quelqu'un, il est prudent de tester sa capacité à l'assumer. Pour tester les candidats au Parlement Européen, nous disposons d'un terrain ad'hoc: celui des langues. Lorsque vous assisterez à une réunion au cours de laquelle un candidat sollicitera vos suffrages, sondez-le par des questions de ce type. Elles seront révélatrices à plus d'un titre.

Demandez par exemple: "Quelles seront vos propositions en ce qui concerne les langues, lorsque la Grèce, (le Portugal, l'Espagne) entrera dans la Communauté Européenne?"

